

Vizitu Nian
Retejon

WWW.BONVOLO.NET

DEMANDON AUX
SUGESTON?

KONTAKTU NIN

0990428340



SEKVU NIN FEYSBUKE

[“MAMA WIMBI”](#)

Maltrafis ion?

Legu antaŭajn

Novaĝleterojn

Ĉi tie

MAMA WIMBI



Novaj Produktoj Por Nova Jaro

La komenco de la lerneja jaro 2019-20 estis tempo de senprecedenca ŝanĝo en Goma.

La ŝanĝo de registaro enkondukis mezuron de registara financita edukado kaj tio permesis malavaraĵn subtenojn, de Aŭstralio kaj Sud-Koreio, esti investitaj en la dua fazo de kompetenta disvolvo por memrespekto.

Bonvenon al la 9-
a (plejofte)
ĉiumonata
Mama Wimbi
novaĝletero!



Nia partnereco kun Lernejo-en-Sako ne nur provizis esencajn lernomaterialojn por 84 feliĉaj infanoj, sed ankaŭ kaŭzis ke nia manaĝero vizitu la fabrikejon en Ugando, kiu estis valora sperto, kaj donis al la teamo fidon por kompetentigi sin konkursi kun la ĉinaj lernejoj sakoj normale aĉeteblan en Kongo.




La foto sur la unua paĝo montras la kudrad- teamon modeligante kelkajn sakojn, kiujn ili kudris per la kutimaj ŝtofoj haveblaj en la merkatoj. Ili ankaŭ fabrikis kelkajn uzanta ŝtofojn de la fabrikejo en Ugando, kaj ankaŭ iujn modajn sakojn por loka vendo, ĝis la tempo por aĉeti lernejajn sakojn denove, je la komenco de la lerneja jaro 2020-21.



Novaĵoj de Eric

Eric Baeni, montrita ĉi tie kun Sothia, la filinet(o de Alphonse, administras la projekton pri korespondado de infanoj en Goma (kun Aŭstralio) kaj dediĉas sin al servado al aliaj ofte.




Antaŭnelonge li estis atakita per maĉeto kaj rabita en sia hejmo. Li bezonis multajn kudrerojn kaj antibiotikojn, sed ŝajnas bone resaniĝanta.

Sia telefono kaj komputileto estis inter la varoj ŝtelitaj, kiu malfaciligos la universitatan studadon. Tamen la 13 labortablaj komputiloj, kiuj baldaŭ alvenos al Goma por publika interreta aliro kaj edukado, dank 'al Rotarian Phil Isaacs (por donado kaj renovigado de la komputiloj) kaj Sonic Healthcare (por transporto).

Tio certe iom helpos.





Alphonse kaj Jacques laboras pri la Strategia Plano de Fazo Du, en nia luita oficejo.



La teamo kudras en nia luita, sociebla laborejo, uzante ĉiam pli sofistikaĵojn, kiujn ili kultivas kaj ekzercas.

Solida Progreso - Koran Dankon al Vi!

Retrorigardante antaŭ nur kelkaj jaroj, nia grupo posedis nur unu komputileto, nur manpleno da niaj klientoj havis iujn ajn vendeblajn kapablojn kaj apenaŭ konis unu la alian, estanta plejparte interne forpuŝita rifugxintoj dividanta ne multon krom nekapablo pagi lerneajn kotizojn, la diferenco nun profundas.

Dank 'al bonkoreco de multaj kiuj povus forrigardi, sed ne faris, kaj al la stoika, justa kaj diligenta administrado de Alphonse, Mama Wimbi estas altvalora centro de espero, edukado kaj komunumo.

Venontjare ni celas sendependigi tiujn familiojn nuntempe senhejmaj sen eksterlanda helpo kaj ni pripensas, ĉu ni povas helpi kelkajn pigmajn infanojn, kiuj bezonas sekuran hejon en Goma por mezlernejo. Ni ĉiuj pagas niajn donacojn antaŭen!



Dankon pro legado de nia informilo, ni esperas, ke vi ĝuis ĝin.

Bonvolu dividi kun viaj amikoj.

Plej korajn bondezirojn de ĉiuj ĉe Mama Wimbi!

Penny Vos